



EKO 2018-22 sendita el Lviv la 19an de oktobro.

Plia atentinda memortabulo

Prelude al la malfermo de la 24a Kongreso de la Ukraina Esperanto-Kongreso okazis inaŭguro de memortabulo por la renoma poeto, verkisto kaj esperantisto Vasil Eroŝenko. La solenaĵo okazis en Lviv en la 19a de oktobro; la kongreso daŭros ĝis la 21a.

En 1991 multaj el la stratoj en Lviv estis renomitaj, unu sufiĉe longa strato ricevis la nomon de Eroŝenko, kaj ĝuste sur la muro de la plej bela kaj artisme ornamita domo de la strato estis starigita la tabulo. Tio okazis pro kunlaboro inter UkrEA kaj la urbaj instancoj.

Tridek ses kongresanoj arigis ekster la domo; reĝisoris la programon la prezidanto de UkrEA, s-ro Eŭgeno Kovtonjuk. Salutis s-ino Oksana Stelmahh, membro de la konsilantaro de tiu milionpopola urbo. Sekvis la saluto kaj gratulo de la vicprezidanto de UEA, Stefan MacGill kun plia saluto de gasto el Litovio, s-ro Zenonas Sabalys.

Posta komuniko raportos pri la tri-taga kongreso, kiu inkluzivas la 52an seminarion en la programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO).

Vortoj: 163





Supre la memortabulo trilingva (foto smg); antaŭpaĝe: la publiko, kun la urba konsilanto maldekstre de la florkono. (foto: ek).

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.